

La heroo vivo de Henri Dunant, 4-a parto
Claude Gacond, 99-a radioprelego, 1964.10.21 & 24

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la kvaran elsendon.

Multaj personoj pro maltaŭga profesia elekto suferegas sian tutan vivon. Henri Dunant estas unu el ili. De sia infaneco li pasie interesiĝis pri religiaj, edukaj kaj sociaj problemoj kaj sin montris pli revema ol realista. Li estis kapabla fariĝi obeata hom-gvidanto, ĉu ni ne vidis lin konstante ĉirkaŭata de kamaradoj? Li posedas la kvalitojn, kiuj permesas fariĝi pedagogo, politikisto aŭ okupiĝi pri medicino. Ĉio en li estas sindonemo al la proksimulo kaj malkapablo limigi siajn okupojn al nuraj profitigaj laboroj.

Sed la patro estas riĉa negocisto. Tio signifas por Henri Dunant komercistan lernadon kaj dungigon en banko kiel oficisto, ĝis kiam venos la momento eniri la patran negocon. Oni eĉ ne pensas al alia profesio. Se Henri havas aliajn ŝatokupojn, li ĉiam povos sin dediĉi al ili kromprofesie. Ĉu la patro ne tion faris koncerne la helpon al la malriĉuloj?

Banka oficisto kutime altestimas la monon. Henri Dunant, kiu de sia infaneco vidis tiom da mizero, neniam povos havi religian respekton por la mono. Lia entuziasmemo por la noblaj kaŭzoj malhelpas lin eviti la aferojn, kiuj ne alportas tujan grandan monprofiton, por sin dediĉi ekskluzive al tiuj, kiuj riĉigas.

Por esti bona financisto, oni devas esti kapabla silentigi la voĉeton, kiu en ĉiu homo riproĉas la malhonestajn agojn. Henri Dunant provos pravigi la rimedojn laŭ la celoj, kvankam li havas la impreson, ke malnobla rimedo nur povas malnobligi la celitaĵon. Li ne sukcesos en tiu vojo.

La juna Henri Dunant estas lerta bank-oficisto. Lia talento por la redaktado kaj homgvidado estas rapide rimarkita de lia estraro. Oni puŝas lin en koloniistan entreprenon, la kompanio por la svisaj kolonioj en Sétif. Estas aŭgusto 1853. Li estas 25-jara. Kun la fiero de tiu vivepoko kaj facila entuziasmo de revemulo li enŝipiĝis por Afriko. Lia unua financa traktado plensukcesas kaj alportas grandan profiton al lia kompanio. Li revenas hejmen por ricevi la gratulojn kaj klarigi siajn intencojn. Li volas akiri kvindekhektaran bienon por kultivi grenon, kaj akvofalon por konstrui muelejon. Estas projekto grandioza, kiu ne entuziasmas liajn estrojn, kiuj facile akceptas maldungi tiun tro entrepreneman junulon. Henri Dunant, kiu bone sukcesis sian unuan komercaĵon, kredas en sia stelo. Li kontaktas bankistojn, kaj dank'al sia socia pozicio facile ricevas monon. Antaŭ ol ricevi sufiĉe grandan koncesion, li jam ekkonstruas la muelejon de siaj revoj, akiras bovarojn kaj ŝafarojn, kiujn li paŝtigas sur malproksimaj kaj tro sekaj bienoj. La veturoj estas malfacilaj kaj multekostaj, la vojoj malsekuraj, la dungitaj paŝtistoj malfidelaj kaj ŝtelemaj. Pro tio la brutaro rapide etiĝas kaj la mono samtempe foriras. Realista financisto tuj estus kompreninta la danĝeron de la situacio. Sed Henri Dunant ĉiam pensis povi akiri la kvindek antaŭrevitajn hektarojn kaj la necesan akvofalon. Li kuras de funkciulo al funkciulo petante koncesion. Li ricevas nebulajn respondojn. Tiam en 1857, kiam li sentas bankrot-minacon, li trovas klarigon al sia malfacila situacio. Li ne ricevis la deziritan koncesion, ĉar li agadis private. Do li fondas anoniman societeton de la Muelejoj de Mons-Djémila. Denove pro sia socia situacio kaj ankaŭ ĉefe pro sia kapablo entuziasmigi la ceterulojn, li senpene akiras duonmilionon da tiamaj frankoj, grandegan sumon por la epoko. En la nomo de la administra konsilantaro de tiu anonima societo de la muelejoj Mons-Djémila Henri Dunant rekomencas sian kuradon al la koncesio. Sed liaj novaj petoj restas sen respondoj. La akciuloj senpacientiĝas. Henri Dunant revenas Ĝenevon por ilin kvietigi. Li uzas strangajn kaj iluziigajn argumentojn. Ĉiu ajn rimedo estas bona: trompo, troigoj. Nur valoras la celo: la akirado de la koncesio. Henri Dunant estas certa, ke li ĝin akiros. La akciuloj ne nur akceptas pacienciĝi, ili eĉ akceptas duobligi la kapitalon de la societo. Generalo Henri Dufour eniras la administran konsilantaron, kaj tiun ĉi fojon, kun la helpo de kolonelo, senatoro, majoro kaj generalo nia stranga financisto revizitas

La heroa vivo de Henri Dunant, 4-a parto
Claude Gacond, 99-a radioprelego, 1964.10.21 & 24

la alĝeriajn kaj parizajn administrejojn por ricevi sian koncesion. Nenia respondo. Henri Dunant ŝanĝas sian naciecon, do li fariĝas franco. Nova reiro al la funkciuloj. Nova malsukceso. Restas ankoraŭ unu espero. La imperiestro. Li, kaj nur li, komprenos la valoron de la projektoj de la societo de la mulejoj Mons-Djémila. Sed kiel atingi la imperiestron Napoleono la tria, kiu militadas en Italio kontraŭ sia kolego Franz-Jozefo. Mirinda ideo : verki libron, kiu celebros la grandajn meritojn de la imperiestro de la francoj, belpresigi ĝin kaj alporti ĝin persone al Napoleono, kaj profiti tiun momenton por peti la necesan koncesion.

Henri Dunant skribaĉas pri la grandeco de la romaj imperiestroj, pri tiu de Karlo la Granda kaj pruvas, helpe de bibliaj profetaĵoj, ke Napoleono la unua estis la spirita kaj vera heredanto de la roma imperiestreco kaj ke Napoleono la tria estas la elektita restariganto de eterna imperio, kies rolo estas konkeri la tutan mondon.

Tuj post la presigo de tiu libro, kies titolo estas seslinia, nia strangulo traveturas la alpajn pasejojn por provi atingi la imperiestron de la francoj. Dank'al altaj pagoj li trovas koĉeron, kiu akceptas riski sian vivon en la malsekuraj vojoj de batal-plena regiono. Ĉu Henri Dunant, sub la influo de la rememoro de la angla heroino Nightingale, deziras ludi filantropan rolon en la itala milito, por altiri la rigardon de la imperiestro ? Ne ! Lia valizo havas ĉion, escepte pansaĵojn kaj kuracilojn. Henri Dunant riskas la tuton por la tuto. Li pensas nur al si. Pro tio li ne vidas la danĝeron de sia situacio. Tiu animstato kondukos lin ĝis la mezo de la batalkampo.

Ni multobligos la tekstojn de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-